

LUSIN

MATENAJ FLOROJ KOLEKTITAJ EN VESPERO

魯迅：朝花夕拾

EL POPOLA ĈINIO

Unua eldono 1981

Presita en la Cina Popola Respubliko

Rimarko de la Eldoninto

Tiu ĉi kolekto de dek eseoj skribita de Lusin (1881-1936) en 1926 estis unuafoje publikigita en septembro 1928 de Weiming-societo kiel unu el la serioj de "Novaj Skriboj de Weiming-societo" kompilitaj de la aŭtoro mem.

La Esperanta eldono de *Matenaj Floroj Kolektitaj en Vespero* estas bazita sur la eldono de la Popola Literatura Eldonejo, Beijing, 1973.

Enhavo

Antaŭparolo	1
Hundo, Kato kaj Rato	4
A-Chang kaj la <i>Libro pri Montoj kaj Maroj</i>	20
<i>La Bildlibro de Dudek Kvar Agoj de Fileca Obeemo</i>	32
La Foiro de la Kvin Ferocaj Dioj	45
Wu Chang aŭ Vivo-Estas-Efemera	54
De Centherba Ĝardeno al Trigusta Legoĉambro	68
La Malsano de Patro	78
Fragmentaj Rememoroj	89
Sinjoro Fuĝino	104
Fan Ainong	116
Postskribo	132

Antaŭparolo

Mi ofte deziras trovi iom da kvieto kaj ripozo el implikiĝo, sed tio estas efektive malfacila. La nuna tempo estas tiel bizara kaj mia menso tiel konfuza. Por homo, kiu venas al stadio, kie restas al li nur rememoroj, lia vivo probable malmulte signifas, sed en kelka tempo eĉ mankas rememoroj. En Ĉinio estas reguloj por verkado kaj la aferoj en la mondo ankoraŭ iras spirale. Antaŭ kelkaj tagoj, kiam mi forlasis la Universitaton Sun Jatsen, mi ekpensis pri mia forlaso de Xiamen-a Universitato; kaj, aŭdante la bruon de aeroplanoj super mia kapo, mi ekmemoris pri la aeroplanoj, kiuj rondflugadis ĉiutage super Beijing antaŭ unu jaro. Tiam mi verkis mallongan artikolon kun la titolo “Ekvekiĝo”¹. Hodiaŭ eĉ tiu “Ekvekiĝo” al mi mankas.

En Guangzhou la varma sezono komenciĝas ja sufiĉe frue. La subiranta suno ĵetas tra la okcidenta fenestro sian lumon tiel fortan, ke oni estas devigata surmeti nur ĉemizon. La “frondo trans akvo” en la vazo sur mia skrib-tablo

1955-03-03

estas io nova por mi. Tio estas detranĉita branĉo, kiu enakvigite kreskigos aminde freŝ-verdajn foliojn. Rigardi tiujn verdajn foliojn kaj kompili kelke da malnovaj manuskriptoj almenaŭ signifas ke mi faras ion. La farado de tiaj aferoj, kiu efektive egalas al morto en vivo, estas sufiĉe bona rimedo por forigi la varmegon.

Antaŭhieraŭ mi finis la kompiladon de la "Sovaĝa Herbaro", nun alvenas la vico por la "Rememoroj pri la Pasinteco", sinsekve publikigitaj en la gazeto "Mang Juan" (Sovaĝa Kampo) kaj ties titolon mi ŝanĝis al "Matenaj Floroj Kolektitaj en Vespere". Kompreneble, multe pli freŝaj kaj aromaj estas la floroj plukitaj kun roso sur si, sed tion mi ne povas fari, nek mi povas metamorfozi mian bizaran kaj konfuzan menson en bizarajn kaj konfuzajn verkojn. Eble en iu tago, kiam mi kaplevante rigardas al la kurantaj nuboj, ili ekflagros antaŭ miaj okuloj.

Dum certa tempo mi ofte rememoradis pri la legomoj kaj fruktoj, kiujn mi manĝis kiel infano en mia naskiĝloko: trapezoj, faboj, akvobambuido, mosk-melonoj. Ĉiuj tiuj estis ekstreme frandaj kaj bongustaj kaj allogis min al mia hejmsopiro. Poste, kiam mi denove manĝis ilin post longa foresto, mi trovis,

ke ili estas nenio speciala; nur dum retrorigardo ili ankoraŭ retenis la malnovan guston. Eble ili trompados min en mia tuta vivo konstante turnante mian penson reen al la pasinteco.

Tiuj ĉi dek artikoloj estas transskribitaj el la memoro, do ili eble iom diferencas de la realo, tamen hodiaŭ mi nur memoras ke ili estas tiaj. Kredeble la stilo estas tute senorda, ĉar la verkado mult-foje interrompiĝis en la daŭro de naŭ monatoj aŭ iom pli. Malsamaj estas ankaŭ la ĉirkaŭaĵoj: la du unuaj estis verkitaj ĉe la orienta muro de mia loĝejo en Beijing, la tri sekvantaj dum mia vagado en hospitaloj kaj en laborĉambro de ĉarpentisto², kaj la kvin lastaj sur la unua etaĝo de la biblioteko de Xiamen-a Universitato, kiam mi estis jam elpuŝita de la kleruloj el ilia kliko³.

Lusin

*Skribita en Pavilono de Blanka
Nubo, Guangzhou, 1 majo, 1927*

¹ Kolektita en *Sovaĝa Herbaro*.

² En marto de 1926, la norda militarista registaro intencis persekuti Lusin kaj aliajn progresemajn klerulojn, tial tiun printempon li estis devigata sin kaŝi en kelkaj hospitaloj unu post alia. Kiam ĉiuj litoj en iu hospitalo estis okupataj, li loĝis en ĉambro uzata kiel laborejo de ĉarpentisto.

³ Dum sia instruado en Xiamen-a Universitato, Lusin estis persekutata de ĝiaj profesoroj de kliko de Hu Shi (1891-1962).

Hundo, Kato kaj Rato

Ekde la lasta jaro mi aŭdis svage la onidiron, ke mi malamas katojn. La atestaĵo estas nature mia novelo “La Kunikloj kaj la Kato”¹, kaj ĉar tio estis mia memkonfeso, kompreneble mi havis nenion alian por diri — sed mi ankaŭ estis neniom ĝenita pro tio. Tamen, en la kurenta jaro mi fariĝis ja iom maltrankvila. Mi ne povas eviti ion skribi de tempo al tempo, kaj kiam miaj skribaĵoj publikiĝis, verŝajne ili tre malofte tiklis la jukon por iuj homoj sed plej ofte tuŝis al ili la doloron. Se mi ne estas atenta, mi eĉ ofendas famajn personojn aŭ famajn profesorojn aŭ, des pli malbonŝance, “mentorojn kiuj havas sur si la respondecon gvidi junulojn”². Tiam estus ekstreme danĝere. Kial? Ĉar tiuj grandaj homoj “ne estas ofende trakteblaj”³. Kial ili “ne estas ofende trakteblaj”? Ĉar ili povas esti tiel ofenditaj, ke ili publikigos leteron en ĵurnalo, anoncante: “Rigardu! Ĉu hundo ne malamas katon? Jen s-ro Lusin mem konfesas sian malamon al la kato, sed samtempe li ankaŭ parolas favore

pri la batado de la 'hundo falinta en akvon!' ” La subtileco de tiu “logiko” kuŝas en tio, ke ili volas pruvi per miaj propraj vortoj ke mi estas hundo. Konsekvence, ĉio, kion mi diris, devas esti komplete renversita. Eĉ se mi dirus, ke duoble du estas kvar, aŭ trioble tri estas naŭ, ankaŭ ĉiuj miaj vortoj eraras. Kaj ĉar tio fariĝas erara, tial la ĝentlemanoj kompreneble estas pravaj eĉ se ili pretendas, ke duoble du egalas sep, trioble tri estas mil, ktp.

Sekve mi ekprovis esplori la “motivon” de ilia malamo. Tio ne signifis, ke mi arogas imiti la modon de tiuj modernaj kleruloj, kiuj laŭdas aŭ degradas verkojn per motivo⁴; mi nur volis purigi min anticipe. Laŭ mia supozo, tio ne estis malfacila por animala psikologo, sed bedaŭrinde mi ne posedis tian specialan scion. Poste mi trovis la kaŭzon en la Folkloro de Natura Historio de D-ro O. Dähnhardt, kiu donis la jenan rakonton: Animaloj kunvenis por diskuti gravan aferon. Ĉeestis birdoj, fiŝoj kaj bestoj escepte de elefanto. Ili decidis lote elekti iun el ili por ĝin alvenigi kaj tiu tasko falis sur la hundon. “Kiel mi povus trovi la elefanton?” demandis la hundo, “Mi neniam vidis nek konis ĝin.” La aliaj respondis: “Tio estas facila. Ĝi havas ĝibon.” La hundo foriris kaj renkontis katon, kiu ekarkigis sian

dorson. Ĝi do invitis la katon kaj ili iris kune. Kiam la hundo prezentis la katon kun arkiĝanta dorso kiel elefanton, la aliaj ĉiuj mokridis ĝin, kaj ekde tiam malamikeco estiĝis inter la hundo kaj la kato.

Kvankam forpasis nur mallonga tempo post kiam la germanoj eliris de la arbaro, tamen iliaj scienco kaj arto jam akiris rimarkindajn atingojn; eĉ la ornamado al iliaj libroj kaj la delikateco de iliaj ludiloj montriĝas amindaj. Sed ĉi tiu fabelo estas efektive senĉarma, ankaŭ la kaŭzo de la malamikiĝo nekonvinka. La kato arkigis sian dorson, tamen ĝi ja ne celas sin ŝajnigi elefanto aŭ pavi fiere per tio. Kulpis ja la senco de la hundo. Finfine tio povis esti kalkulata kiel iu motivo. Mia malamo al la kato estis tamen tre diferenca ol tio.

Fakte, estas ne necese ke oni faras tiel akran distingon inter homo kaj besto. En animalujo, kvankam ne estas tiel komforte kaj libere kiel la antikvuloj imagis, sed tie estas malpli da abomeninda afektado ol en la homara socio. La animaloj agas laŭ sia naturo kaj diras nenion vorton por pravigi sian agon ĉu ĝustan aŭ malĝustan. Vermoj eble estas malpuraj, sed ili neniam pretendas pri sia senmakuleco. Ke ferocaj vulturoj kaj bestoj prenas la malpli fortajn kiel siajn nutraĵojn, tio meritas esti

nomata kruela, sed ili ja neniam starigas flagojn de “justeco” kaj “praveco”⁵ por ke la viktimoj ĉiam admiru kaj laŭdu ilin eĉ ĝis la tempo kiam tiuj estas manĝataj. Kiam homo scipovis stariĝi rekta, tio estis kompreneble granda progreso. Kiam li scipovis paroli, tio estis alia granda progreso. Kiam li scipovis skribi kaj verki, tio estis ankoraŭ plia progreso. Tamen ankaŭ degenero estiĝis, ĉar tiam komenciĝis la vanta parolo. Ankoraŭ ne malbona estas la vanta parolo; en certa tempo oni eĉ nekonscie diras kontraŭvolan parolon, kaj tiuokaze la homo devas senti honton kompare kun tiuj bestoj kiuj scipovas nur krei. Se efektive ekzistas supre la Kreinto, kiu rigardas ĉiujn kreitojn egalaj, eble li opinias tiujn lertajn artifikojn de la homo superfluaj, ĝuste kiel ni vidas en zoo la transkapiĝon de simioj aŭ saluton de elefantinoj, kaj kvankam ni tiam ofte ekridas nedeteneble, sed samtempe ni sentas malkomforton, eĉ triston, opiniante, ke tiuj superfluaj lertaj agoj prefere estu forlasitaj. Tamen, estante homoj, vole nevole ni devas “kunagi kun sampartianoj por oponi la kontraŭulojn” kaj provas pravigi nin mem imitante la ekzemplon de aliaj homoj kaj laŭ la moro de la nuntempo.

Nun, rilate al mia antipatio al katoj, mi konsideras ke mi havas sufiĉe da motivoj kaj ke mi estas justa kaj prava. Unue, en naturo la kato estas diferenca ol aliaj bestoj. Kiam ĝi kaptas birdon aŭ raton, anstataŭ tuj mortigi la viktimon per ekmordo, ĝi ĉiam turmente forlasas, rekaptas kaj denove forlasas ĝin, kaj ĝi ĝin manĝas nur post kiam ĝi jam enuiĝas de sia ludo. Tio ege similas al la malbona kutimo de la homo, nome, li ĝojas pri la malfeliĉo de la malfortuloj kaj malrapide plilongigas ilian suferon. Due, kvankam la katoj devenas de la sama familio kiel leonoj kaj tigroj, sed kian vulgaran konduton ili havas! Tamen tio eble apartenas al ilia naturo. Se ili havus grandecon dekoble la nunan, oni efektive ne povas scii kian konduton ili prenos. Sed tiuj argumentoj kvazaŭ ekaperas nur en la momento de mia skribado, kvankam mi kredas, ke ili jam okupis mian penson pli frue. Pli bona klarigo estas simple tio, ke ilia kriadado dum pariĝo fariĝas tiel kompleksa agado, kaj ĝi estas ĝeniga por la nervoj precipe dum nokto kiam oni volas legi aŭ dormi. Dum tiuj okazoj, mi ĉiam atakas ilin per longa bambua stango. Kiam gehundoj pariĝas sur strato, senokupantoj ofte bategas ilin per bastono. Iam mi vidis bronzgrafikaĵon de P. Bruegel d. Ä, titolitan Allegorie der

Wollust, kiu montras ankaŭ tian agon, kiu ĉiam estis kaj estas komuna al Ĉinio kaj ĉiuj aliaj landoj.

Depost kiam la obstina aŭstria scienculo Sigmund Freud iniciatis psikanalizon — kiun s-ro Zhang Shizhao tradukis onidire kiel “koran ekzamenon”, kio estas vere simpla kaj antikveca sed malfacile komprenebla termino — kelkaj el niaj famuloj kaj eminentaj profesoroj uzas ĝin en sia aludo, sugestante ke tiuj aferoj devas esti atribuitaj al seksa deziro. Nun, lasu for la aferon pri la bato al la hundo. Rilate al mia bato al la kato, tion kaŭzas nur ilia kriado, kaj mi havas neniun malicon, kredante ke mia envio estas neniel granda. En la nuna tempo, kiam oni facile alportas al si riproĉon pro ĉiu eta movo, mi ja devas tion deklami antaŭe. Ekzemple, antaŭ sia geedziĝo, ankaŭ la homoj havas sufiĉe longan procedon. La nova maniero estas skribi almenaŭ faskon, aŭ eĉ pakajon da am-leteroj, la malnova maniero estas “demandi pri nomoj”, “sendi gefianĉigajn donacaĵojn”⁶, kliniĝi kaj genuiĝi. Kiam la familio Jiang de Haichang okazigis lastjare nupton en Beijing, ili uzis tri tutajn tagojn por la ceremonio kaj presigis ruĝkovrilan Nuptan Manlibron kun antaŭparolo, en kiu ili eksplikis: “Por diri ĝuste, ĉiuj ritoj devas esti zorgeme ellaboritaj.

Se simpleco estas la sola celo kiun oni strebas, pro kio do oni ankoraŭ bezonas la ritojn? ... Tial, ĉiuj ritaspirantoj devas vigle leviĝi sed neniel descendu al la plebo kiu estas tro malalta por la ritoj!" Tamen, mi neniom koleris, ĉar ili ja ne devigis min ĉeesti, kaj tio montras ke la kaŭzo de mia malamo al la kato simple kuŝas en tio, ke ili kriadas tre proksime de miaj oreloj. La diversajn ritojn kiuj ne estas la afero de la nekoncernatoj mi ne priatentas. Sed, se iu venas kaj devigas min deklami am-leterojn aŭ riverenci kune kun li, kiam mi ĝuste volas legi ion aŭ dormi, mi nepre defendos min mem per longa bambua stango. Krome, mi ankaŭ ne tre ĝojas tiam, kiam iuj, kun kiuj mi havis ordinare malmulte da interkomunikigado, subite sendis al mi ruĝan invitilon kun presitaj frazoj kiaj "pro la nupto de mia junfratino" aŭ "la edziĝo de mia filo" "ni havas la honoron inviti vin" aŭ "mi petas la ĉeeston de via tuta familio" kiuj enhavas en si "insidajn sugestojn", tiel ke mi sentus iom da embaraso, se mi ne elspezus kelkan monon por fari donacon.

Tamen, ĉio ĉi tio apartenas al la nuna tempo. Rememoro pruvas, ke mia malamo al la kato ekdatiĝas longe antaŭ mi povis doni la suprajn kaŭzojn, kaj tiam mi estis nur

proksimume dekjara. Eĉ hodiaŭ mi klare memoras, ke la kaŭzo estis treege simpla: ĉar la kato manĝas musojn — ĝi manĝis la amindan dorlotatan museton, kiun mi bredis.

En la okcidentaj landoj, laŭ onidiro, la nigran katon oni ne tre ŝatas. Mi ne scias ĉu tiu onidiro estas fidinda, sed la nigra kato en la rakontoj de Edgar Allan Poe estis efektive timinda. La japanaj katoj tre facile fariĝas spiritoj, kaj la feroceco de la “kat-ŝamanino”, kiu devoras homojn, estas des pli terura. En Ĉinio, kvankam estis “kat-diabloj” en antikva tempo, tamen lastatempe oni tre malofte aŭdas iliajn malicojn, verŝajne la olda magio jam perdiĝis kaj ili fariĝas honestaj. Sed, en mia infanaĝo mi ĉiam sentis ilin iom monstraj, sekve havis neniom da simpatio por ili. Tio okazis en iu somera vespero en mia infanaĝo, kiam mi kuŝis ĝuante iom da malvarmeto sur malgranda tablo sub giganta osmantarbo, kaj mia avino sidis apud la tablo svingante tifaan ventumilon kaj rakontis al mi enigmojn kaj rakontojn. Subite, aŭdiĝis sur la osmantarbo skrapo kaj paro da fosforeske flagrantaj okuloj descendis en mallumo kun la bruo. Tio surprizis min, kaj ankaŭ la avino interrompis sian rakonton kaj komencis rakonti pri la kato.

“Ĉu vi scias, ke la kato estis instruisto de la tigro?” ŝi diris. “Kiel vi infanoj povus scii ke la kato estis majstro de la tigro? En la komenco la tigro ja scipovis nenion. Do ĝi sin turnis al la kato por lerni. La kato instruis ĝin kiel sinĵeti, kapti, kaj manĝi la kaptaĵon ĝuste kiel la kato mem kaptis musojn. Kiam finiĝis ĉiuj lecionoj, la tigro pensis, ke ĝi jam ellernis ĉiom da kapabloj kaj neniuj povus superi ĝin escepte nur de la instruisto kato. Se ĝi, la tigro, mortigus la katon, ĝi mem fariĝos la plej potenca. Tiel decidinte, la tigro sinĵetis al la kato. Tamen la kato jam delonge sciis ĝian fiintendon, kaj, per eksalto ĝi facilmove iris sur la arbon, dume la tigro nur povis kaŭri gape sub la arbo. La kato ne fininstruis siajn ĉiujn kapablojn, ĝi ankoraŭ ne instruis la tigron surgrimpigi la arbon.”

Vere bonŝance, mi pensis. Estas feliĉe ke la tigro tro malpacientiĝis, alie de sur la osmantarbo descendus tigro. Tamen, finfine la okazaĵo estis tre timinda. Mi volis eniri en la ĉambron kaj dormi. La nokto fariĝis des pli malluma. La foliaro de la osmantarbo tremis susure, kaj ankaŭ ekblovis venteto. Supozeble la mato jam fariĝis frideta, ke mi povus kuŝi sur ĝi kviete sen turniĝado.

En domo kelk-jarcentojn aĝa, sub la malforta lumeto de olelampo, estis libera mondo de la ratoj, kiuj facilmove iris kaj akre krietis. Ilia sinteno estis ofte eĉ pli aroganta ol tiu de la “famaj personoj kaj eminentaj profesoroj”. En nia domo estis bredata kato, sed satigante sin per siaj ĉiutagaj manĝoj ĝi ne plu atentis pri la ratoj. Kvankam mia avino kaj aliaj ofte plendis pri tio, ke la ratoj roddifektis komodojn aŭ ŝtelis manĝaĵojn, sed mi ne konsideris tion granda krimo, kaj tio neniel koncernis min. Krome tiajn kulpojn faris nur la grandaj ratoj, kaj tiajn oni ne devis atribui al mia dorlotata museto. Tiu museto, ne pli granda ol onies dikfingro, plej ofte moviĝis sur planko kaj ne tre timis homojn. La loka nomo por ili estis *yinshu*, kaj ili ja diferencis de tiuj, kiuj vivas en la tegmento. Fronte de mia lito gluiĝis du koloraj lignogravuraĵoj. La unua, “La Edziĝo de Porko”, konsistis el multaj longaj buŝoj kaj grandaj oreloj, kiujn mi opiniis ne tre belaj. La alia, “La Nupto de Ratoj”, tamen estis sufiĉe ĉarma. Ĉiuj ratoj en ĝi, ekde la novedzo, novedzino ĝis honoraj prizorgantoj de la geedziĝanta paro, gastoj kaj servantoj, havis senescepte altajn makzelojn kaj maldikajn gambojn, tre simile al kleruloj, sed ĉiuj en ruĝaj jakoj kaj verdaj pantalonoj. Mi pensis ke